



Maŭ Zedong

Poemoj

Fremdlingva Eldonejo

e-Librigita de Elerno, aprilo 2006

ENHAVO

Ĉangŝa

La Turo de la Flava Gruo

Ginggangŝan

Milito inter Ĉjang Kajŝek kaj la Gŭanghi-aj

Militaristoj

La Duobla Naŭa

Novjara Tago

Sur la Vojo de Gŭangĉang

De Tingĝoŭ al Ĉangŝa

Kontraŭ la Unua “Ĉirkaŭekstermo”

Kontraŭ la Dua “Ĉirkaŭekstermo”

Dabodi

Hujĉang

Loŭŝan-Pasejo

Tri Poemetoj

La Longa Marŝo

Kunlun

La Monto Liŭpan

Neĝo

La Popola Liberiga Armeo Konkeris Nankinon

Responde al Sinjoro Liŭ Jazi

Responde al Sinjoro Liŭ Jazi

Beidaihe

Naĝado

Responde al Li Ŝuji

Adiaŭo al la Dio Plago

Veno al Ŝaŭŝan

Ascendo al Luŝan

Surskribo al Foto de Milicianinoj

Responde al Amiko

La Fea Kaverno de Luŝan

Responde al Kamarado Gŭo Mojŭo

Umeo

Vintraĵ Nuboj

Responde al Kamarado Gŭo Mojŭo

Revizito al Ginggangŝan

Dialogo de Du Birdoj

Klarigoj

Noto pri la Versformo

Ĉangŝa¹

—Laŭ melodio *Kinjŭanĉun*

Mi staras sola en aŭtuna frido
Surkape de l' Oranĝ-insulo²,
Dum Hjanggiang³ fluas al la nordo.
Jen tute karmezinas dek mil montoj,
Kun arboj tinkturitaj vicoj super vicoj;
Kristale glaŭkas akvo plenrivera,
Antaŭen strebas cent velŝipoj.
Sin pafas agloj al ĉielo l' vasta,
Kaj ŝvebas fiŝoj en la fundo klara.
Sub prujnĉiel' estaĵoj ĉiuj per liber' konkuras.
Antaŭ la spaco kaptas min demando:
Kiu decidas pri la granda lando
La sinkon kaj leviĝon?

Ĉi tien mi alvenis kun kompanoj,
En la memor' ankoraŭ vivas l' eventriĉaj jaroj.
Ni, junaj kunlernantoj, tiam
Disfloris pompe en talento,
Kaj la temperament' studenta
Nenian bridon konis.
Kritike montris ni la montojn kaj riverojn,
Kaj skribis vervajn artikolojn,
Prenante la tiamajn potenculojn kiel sterkon.
Ĉu restas la memoro,
Ke frapis ni la akvon en mezfluo,
Kie retenis l' ondoj flugrapidajn barkojn?

La Turo de la Flava Gruo⁴

—Laŭ melodio *Pusaman*

Printempo 1927

Naŭ fluoj⁵ kuras vaste tra l' mezland',
Linio⁶ sin etendas foren inter nord' kaj sud'.
Sub la vualo de nebula pluv'
La riveregon⁷ ŝlosas la Serpent' kaj la Testud'⁸.

Kien jam flugis for la Flava Gru'?'
Postrestas por turistoj nur la tur'.
Ofere mi disverŝas vinon al la flu',
Kun l' ondoj tajd' leviĝas en la kor'.

Ginggangŝan⁹

—Laŭ melodio *Higjang'jŭe*
Aŭtuno 1928

Videblas sube niaj flagoj kaj standardoj,
Surmonte sonas kornoj kaj tamburoj.
La malamikoj nin sieĝas en mil vicoj,
Ni tamen staras firme kiel roko.

Delonge ni jam plifortigis defendaĵojn,
Kaj plie l' unueca vol' fortreson formas.
Aŭdiĝas kanon-tondro de Hŭang'janggje¹⁰—
Informo: malamikoj fuĝis en vualo nokta.

Milito inter Ĉjang Kajŝek kaj la

Gŭanghi-aj Militaristoj¹¹

—Laŭ melodio *Kingping'jŭe*

Aŭtuno 1929

Abrupte ŝanĝiĝas la vento kaj nuboj:

Jen interbatalas denove la militaristoj,

Semante tra l' lando nur plendojn—

Refoje “la sonĝo milia”¹².

La ruĝaj standardoj jam saltis trans Tingĝiang¹³,

Direktis sin rekte al Long'jan kaj Ŝanghang¹⁴.

Reprenis ni parton de “pelvo la ora”¹⁵,

Nun ĉie ekbolas la ter-dividado.

La Duobla Naŭa¹⁶

—Laŭ melodio *Caisangzi*
Oktobro 1929

La hom' facile maljuniĝas, la naturo ne.

Revenas jar' post jaro la Duobla Naŭa.
Kaj jen denove la Duobla Naŭa,
Aparte bonodoras flavaj floroj sur batala kamp'.

En ĉiu jar' intensas la aŭtuna vent',
Printempan vidon tio ne similas,
Printempan vidon tio ja superas.
Mil-lia prujno tra vasteco de l' ĉielo kaj river'.

Novjara Tago

—Laŭ melodio *Ĵumengling*
Januaro 1930

Ninghŭa, Kingliŭ, Gujhŭa¹⁷,

Pad' mallarĝa, arboj densaj, musk' glitiga.

Kien celas ni hodiaŭ?

Rekte al piedo de la monto Vuji.

Al la montpiedo, al la montpiedo,

Pitoreske flagras ruĝaj flagoj en la vento.

Sur la Vojo de Gŭangcāng¹⁸

—Laŭ melodio *Gjanzi Mulanhŭa*
Februaro 1930

Ĉie blankaj' sub la ĉielo,

Pli verve strebas ni antaŭen en neĝado.

Super ni altaj montoj,

De vent' ruliĝas ruĝaj flagoj trans pasejon grandan.

Kien ni celas per la marŝo?

Al Gan-rivero¹⁹ neĝe vualita.

Hieraŭ venis jam ordono,

Al Gi'an²⁰ sturmas cent mil laboristoj-kampanoj.

De Gingôŭ²¹ al Ĉangŝa

—Laŭ melodio *Djeljanhŭa*

Julio 1930

L' Arme' Ĉiela punas en juni' la putrajn fortojn,
Kun volo ligi *kunpeng*²² per ŝnurego mejlojn longa.
Trans la rivero Gan angul' ruĝiĝis,
Danke al nia alo sub Hŭang Gongljŭe²³.

Leviĝis milion' da laboristoj, kamparanoj,
Por tralalai Gjanghi, rekte sturmi Hunan, Hubej.
Responde al kantad' potenca de *L' Internacia*,
Tempesto plonĝas por ni de la firmamento.

Kontraŭ la Unua “Ĉirkaŭekstermo”²⁴

—Laŭ melodio *Jugjaŭ*
Printempo 1931

En prujna temp’ la arboj pompe karmezinas,
L’ indigno de l’ Arme’ Ĉiela ŝprucas ĝis la nuboj.
Nebul’ vualas Longgang²⁵, malheliĝas mil montpintoj.
Ekkrias ĉiuj ĝoje:
Ĝang Hujzan estas jam kaptita en la fronto!

Ducent mil malamikoj ree venas en Gjanghi-n,
De alte alruliĝas nub’ de fum’ kaj polvo.
Vekitas miriad’ da laboristoj, kamparanoj
Al lukt’ unuanima,
Tumultas ruĝaj flagoj ĉe la monto Buĝoŭ*.

*Noto de la aŭtoro:

La historio de Gonggong kiu kape batis Buĝoŭ-monton:

La ĉapitro “Pri Astronomio” en *Hŭaj Nan Zi* diras: “En antikveco Gonggong batalis kontraŭ Ĝŭanghju por trono. Pro kolero Gonggong kape batis Buĝoŭ-monton, tiel ke rompiĝis apogkolonoj de la ĉielo kaj disŝiriĝis ligŝnuroj de la tero. Sekve la ĉielo kliniĝis en la nordokcidento, tiel ke la suno, luno kaj steloj tien moviĝas; kaj la tero oblikviĝis en la sudoriento, tiel ke akvoj kaj polvo tien amasiĝas.”

“La Kroniko de Ĝoŭ” en *Gŭo Ju* diras: “En antikveco Gonggong, deflankiĝinte de la ĝusta vojo, perdis sin en ekscesa diboĉo. Li provis bari riverojn, ebenigi montojn kaj profundaĵojn malutile al la mondo. Lin ne benis la ĉielo nek helpis la popolo. Okazis samtempe plago kaj ribeloj, kaj pro tio li pereis.” (Komentario de Vej Ĝaŭ: “Laŭ la palaca oficisto Gja [t.e. Gja Kuj de la Orienta Han-dinastio]; Gonggong estis estro de Gjang-klano kaj posteulo de Jan Di. Kiam Ĝŭanghju malpotenciĝis, Gonggong agredis aliajn vasalojn, batalis kontraŭ Gaŭhin kaj surtroniĝis.”)

En “La Analoj de Tri Regnestroj”, verkita de Sima Ĝen

kompetige al la *Historia Libro Sima Kjan*: “En la lastaj jaroj de ŝia (Njuva-a) regado, unu el la vasaloj, nomata Gonggong, potenciĝis dank’ al praktikado de saĝeco en regado kaj suvereco en punado. Li Regis tirane, ne sekvante la tradiciojn de antikvaj reĝoj. Por heredi la tronon de Njuva, li volis sekvi la “lignon” (Njuva) per “akvo” (li mem), malobservante la regulan vicordon de la Kvin Elementoj. Pro tio li batalis kontraŭ Ĝujong. Ne povante venki sian kontraŭulon, li en kolero frapis Buĝoŭ-monton per sia kapo, faligante la monton kaj rompante apogkolonojn de la ĉielo kaj ligŝnurojn de la tero.

Mia opinio: La supraj citaĵoj malakordas inter si. Mi apogas tiun el *Hŭaj Nan Zi*, ke Gonggong estis venkinta hero. Bonvolu rimarki: “Pro kolero Gonggong kap batis Buĝoŭ-monton, tiel ke rompiĝis apogkolonoj de la ĉielo kaj disŝiriĝis ligŝnuroj de la tero. Sekve la ĉielo kliniĝis en la nordokcidento, tiel ke la suno, luno kaj steloj tien moviĝas; kaj la tero oblikviĝis en la sudoriento, tiel ke akvoj kaj polvo tien amasiĝas.” Ĉu Gonggong pereis ĉe tio? Pri tio *Hŭaj Nan Zi* nenion diras. Estas videble, ke li ne mortis, kaj li efektive venkis en la fino.

Kontraŭ la Dua “Ĉirkaŭekstermo”²⁶

—Laŭ melodio *Jugjaaŭ*
Somero 1931

Ekstari volas nuboj sur la monto Blanka Nubo²⁷,
Intensas batalvokoj sube ĉe la montpied’.
Al la batal’ aliĝas eĉ la arboj velkaj kaj kadukaj.
Alpremas fusilaro,
Fluganta General’²⁸ descendas de l’ ĉielo.

En dek kvin tagoj ni rapidis sepcent liojn,
Nebulas Gan-river’ kaj verdas montoj de Fugjan.
Amase l’ malamikojn ni forrulas kiel maton.
Ploretas iu vee,
Al kio helpas “Bastionon ĉiupaŝe”²⁹!

Dabodi³⁰

—Laŭ melodio *Pusaman*
Somero 1933

Ruĝa, oranĝa, flava, verda, blua, indiga, viola —

Kiu ekdancas kun iris-rubando sur ĉielo?
Post pluv' la sun' revenas kliniĝanta,
La monto kaj pasejo jen kaj jen bluiĝas.

Batal' ĉi-loke furiozis siatempe,
Dommuroj de l' vilaĝo truiĝis de kugloj.
Ornamas ili la pasejon kaj la monton
Dotante tiujn nun per pli da belo.

Hujĉang³¹

—Laŭ melodio *Kingping'jŭe*
Somero 1934

Aŭroras baldaŭ en la oriento,

Ne diru: “Vi ekiras frue.”

Marŝinte tra la verdaj montoj ni ne maljuniĝis,

Ĉi-flanke la pejzaĝo belas senkompare.

Montkrestoj l' altaj ekster l' urbo Hujĉang,

Ondegas rekte ĝis la orienta maro.

Suden almontras Gŭangdong niaj batalantoj:

Pli pompe kaj pli verde tie en la foro.

Louŝan-Pasejo³²

—Laŭ melodio *Jikin'e*
Februaro 1935

La okcidenta vento furiozas,
Sovaĝ-anseroj gakas en la spac' sub luno prujn-matena.
Sub luno prujn-matena,
Krepite ĉevalhufoj sonas,
Singulte klarionoj tonas.

Ne diru ke l' pasej' impona fortas kiel fero,
Grandpaŝe nun ni ĝin transpasas.
Ni ĝin transpasas,
Blua montar' al mar' similas,
La sun' vespera sange brilas.

Tri Poemetoj

—Laŭ melodio *Ŝiliŭziling*
1934-1935

I

Montoj!

Vipas mi rapid-ĉevalon sen forlas' de l' selo.
Mir' ĉe kap-returno:
Nur tri futojn tri for de l' ĉielo.*

II

Montoj!

Kvazaŭ ondegar' ruliĝas ĉe renvers' de maro,
Kaj galopas haste
Mil ĉevaloj en batalo arda.

III

Montoj!

Sen rompiĝ' de l' pint' trapikis vi l' ĉielon bluan.
La ĉielo falus,
Se al ĝi subteno via mankus.

***Noto de la aŭtoro:**

Popolkanto diras:

*Supre estas Monto de Skeletoj,
Kaj malsupre Monto de Trezoroj,
Nur tri futojn tri for de l' ĉielo.
Transirante, klinu sin marŝantoj,
Kaj forlasu la selon rajdantoj.*

La Longa Marŝo

—Ljuŝi

Oktobro 1935

Ruĝa Arme' ne timas provojn de la Longa Marŝo,
Por ĝi nur bagatelo dek mil montoj kaj riveroj.
La Kvin Montĉenoj³³ serpentumaj dancas ondetare;
Ruliĝas grandioza Vumeng³⁴ kiel ter-globetoj.
La akv' de Ginŝa³⁵ batas bole, klif' nubtuŝa varmas,
Riveron Dadu³⁶ spanas pont', la feraj ĉenoj fridas.
Pli ŝatinda estas la mil-lia neĝ' sur Minŝan³⁷,
De l' tri armeoj³⁸ a' anoj ĝojradias post transiro.

Kunlun³⁹

—Laŭ melodio *Njannujaŭ*

Oktobro 1935

En la ĉielo ŝoviĝinte

La kruda Kunlun,
Satvidas la printempojn de la homa mondo.
Flugigas ĝi tri milionojn da jaddrakoj*,
Kaŭzante froston tra la spaco.
Dum la degel' somera,
Riveroj ekinundas,
Turnante homojn en testudojn, fiŝojn.
Kiu prijuĝis iam
Jarmilajn kulpojn kaj meritojn ĝiajn?

Al Kunlun nun mi diras:

Ne estu tiel alta,
Nek havu tiom multan neĝon.
Se povus mi eltiri glavon al ĉiel' apogiĝantan,
Mi vin dishakus en tri partojn:
Unu donace al Eŭropo,
Al Amerik' alian,
La lastan por la Oriento.
Aperos tiam paca mondo,
La samajn varmon kaj malvarmon ĝuos la terглоbo.

*** Noto de la aŭtoro:**

Iu antaŭulo skribis: “Post la batalo de tri milionoj da jaddrakoj, la deŝiritaj skvamoj ŝvebas svarme tra l' ĉielo.” Per tio li priskribis la flugantan neĝon. Nun mi pruntas la esprimon por priskribi la neĝkovritajn montojn. En somera tago, mi rigardis malproksimen sur Minŝan kaj vidis, ke la montoj ŝajnas fluge dancantaj kaj estas tute blankaj. Laŭ popola legendo, la montoj ĉiuj estis flamantaj sistempe, kiam Sun Vukong⁹⁵ pasis ĉi tie. Estis li, kiu prunteprenis palmo-ventumilon kaj estingis la fajron, tiel ke la montoj fariĝis blankaj.

La Monto Liŭpan⁴⁰

—Laŭ melodio *Kingpingjŭe*
Oktobro 1935

Ĉielo altega kaj nuboj maldensaj,
Sovaĝaj anseroj forflugas al sud' el la vido.
Kiu ne atingos la Longan Muregon, ne estos bravulo,
Ni marŝis en tute jan dudek mil liojn.

Sur pinto la alta de Liŭpan,
Ruĝflagoj gajludas kun vent' okcidenta.
Hodiaŭ ni tenas en mano jam longan ŝnuregon,
Do kiam ni ligos la Drakon Grizbluan⁴¹?

Neĝo

—Laŭ melodio *Kinjūanĉun*
Februaro 1936

Pejzaĝo de nia nordlando:

Mil-lia vastaĵ' de glac' enfermita,
Kirligās neĝflokaj en spac' dekmil-lia.
Cis kaj trans la Longa Murego,
Postrestas nur blanko senlima;
Kaj supre-malsupre de l' granda rivero⁴²,
Subite perdiĝas ĝia torentado.
La montoj dancas onde kiel arĝentaj serpentoj,
La altebenaĵoj* kuras kvazaŭ vaks-elefantoj,
Volante konkuri kun la firmament' pri alteco.
Nur en suna tago, la lando
En blanka vestaĵo kun ruĝa ornamo
Ja ĉarmas aparte superbe.

Ho, tiel allogaj la montoj, riveroj,
Ke antaŭ ili tiom multaj herooj konkure sin klinis.
Sed mankis iom al Kin Ŝihŭang, Han Vudi⁴³
Talent' en beletro,
Kaj iel lamentis Tang Tajzong, Song Tajzong⁴⁴
En l' art' poezia,
Ĝingis-Ĥan, la fil' de l' ĉiel' dorlotata
En sia epoko,
Nur sciis arkpafi vulturojn.
Jam ĉiuj forpasis!
Por verajn heroojn kalkuli
Sin turnu oni al nuntempo.

***Noto de la aŭtoro:**

Aludo al la altebenaĵo de Ŝenhi kaj Ŝanhi.

La Popola Liberiga Armeo Konkeras

Nankinon⁴⁵

—*Ljuŝi*

Aprilo 1949

Abrupte ŝtormo levis sin super la monto Ĝongŝan⁴⁶,
La riveregon⁴⁷ jam transpasis potenca armeo.
La nuno de l' "kaŭranta tigr'" superas l' estintecon.
Entuziasm' ekboldas en renvers' de l' ter', ĉielo.
Pli brave persekutu l' pereantajn malamiojn,
Ne caŝu vantajn famon, imitante Hiĉu Bavang⁴⁸.
Eĉ la naturo maljuniĝus, se ĝi havus senton.
Hommonda leĝo: ŝanĝiĝad' de mar' en moruskampojn⁴⁹.

Responde al Sinjoro Liŭ Jazi⁵⁰

—*Ljuŝi*

29 aprilo 1949

Por mi ne forgesiĝas nia tetrinkad' en Gŭangĝou⁵¹,
Kiam folioj flavis, versojn petis vi en Ĉongking⁵².
Post tridek unu jaroj⁵³ reveninte al Pekino,
Vian poemon brilan legis mi en temp' florfala.
De troa plend' vin gardu kontraŭ intesto-rompiĝo;
Aferojn traktu ĉiam en pli foraj perspektivoj.
Ne opiniu malprofunda l' akvon de Kunminghu⁵⁴,
Superas ĝi riveron Fuĉun⁵⁵ por rigardi fiŝojn.

Poemo de Liŭ Jazi

Miaj Okazaj Pensoj Prezentataj al

Prezidanto Maŭ

—*Ljuŝi*

Kiel apokfaranto vi elstaras efektive;
Persvadi Hjang al Liŭ subiĝi⁵⁶ por mi malfacilas.
Por interpreti klasikajojn mi ne estas Vulu⁵⁷,
Pro mank' de ĉaro Feng Hŭan⁵⁸ grumblis tintigante glavon.
La fuŝan uzon de la kap' bedaŭras mi delonge,
Sed fidelecon ne forgesis gardi en la koro.
Se povos tuj triumfi la Ekspedicio Suda,
“Fiŝejon de Ziling”⁵⁹ mi trovos tiam en Fen-lago⁶⁰.

Responde al Sinjoro Liŭ Jazi

—Laŭ melodio *Hŭanhiŝa*

Oktobro 1950

*Spektante celebran prezentadon okaze
de la nacia festo de 1950, s-ro Liŭ Jazi
improvizis poemon laŭ melodio Hŭanhiŝa,
al kiu mi respondis.*

En Ĉihjan⁶¹, tagiĝo lantis, nokto longe daŭris,

Dum jarcent' demonoj, monstroj kirlis sin freneze,
Disigitis la popolo kvincent-miliona.

Nun jam kriis kokoj, sub ĉiel' ekhelas ĉio,
Jen muzikoj el mil lokoj, inkluzive Jutjan⁶²,
La poet' senprecedence inspirita ĝoje.

Poemo de Liŭ Jazi

—Laŭ melodio *Hŭanhiša*

Vespere de la 3-a de oktobro ensembloj de diversaj nacimalplimultoj el la Sudokcidento kaj tiuj de Hin'gjang, de Janbjan de Gilin-provinco kaj de la Interna Mongolio prezentis kantojn kaj dancojn en la halo Hŭajjentang. Por celebri la grandan unuiĝon de la naciecoj mi skribis jenan poemon laŭ peto de Prezidanto Maŭ.

Festofajroj, brilaj lampoj, nokto sen mallumo.
Fratoj kaj fratinoj dancas kun gracia ŝvebo.
Ŝvelas ĉiam pli la son' de l' kant' *La Plena Luno**.

Sen gvidad' sagaca de la eminenta homo,
Kiel povas cent nacioj veni en kunecon?
La vesper' de gaja fest' ne havas precedencon.

***Noto de Liŭ Jazi:**

Estis plenumita la kazaĥa popolkanto de Hin'gjang *La Plena Luno*.

Bejdajhe⁶³

—Laŭ melodio *Langtaŭša*
Somero 1954

Torrente pluvas super Joŭ-Jan⁶⁴,
La ĉielrandon lekas blankaj ondoj.
Ekster Kinhŭangdaŭ la fiŝistaj ŝipoj
Ne plu videblas sur la vasta maro.
Kien jam ili malaperis?

Paseo antaŭ mil' da jaroj,
Vej Vudi⁶⁵ svingis vipon,
Alvenis orienten al Gjeŝi⁶⁶, postlasis versojn.
Susuras nun denove la aŭtuna vento,
Sed jam ŝanĝiĝis la hommondo.

Naĝado

—Laŭ melodio *Ŝujdjaŭgetoŭ*
Junio 1956

Tuj post la trink' de Ĉangŝa-akvo,
Mi manĝis ankaŭ Vuĉang-fiŝon.
Nun dekmil-lian Janzi mi transnaĝas,
Tra l' vasta firmament' de Ĉu⁶⁷ etendas mi l' rigardon.
Malgraŭ blovad' de vento, kaj batad' de ondoj,
Al mi pli plaĉas tio ol promen' en kort' kvietaj.
Hodiaŭ mi plezuras de malstreĉo.
Rimarkis foje Konfuceo ĉe rivero:
“Kiel ĉi akvo fluas for la tempo!”

Moviĝas veloj en la vento,
Kvietas montoj la Testud', Serpento,
Grandegaj planoj elfritaj:
Pontego⁶⁸ fluge spanos inter sud' kaj nordo —
Vojaĝ' formiĝos super la prafoso.
Plie ŝtonmur' stariĝos en rivero l' okcidenta,
Por bari nubojn kaj pluvojn de Vuŝan⁶⁹;
Kaj glata lag' aperos en kanjono.
Ankoraŭ devus resti la Diino,
Ŝi mirus pri l' ŝanĝiĝo de la mondo.

Responde al Li Ŝuji⁷⁰

—Laŭ melodio *Djeljanhŭa*

11 majo 1957

Mi perdis fierindan Jang⁷¹, vi vian Liŭ⁷²,

Leviĝis ili rekte al ĉiel’,

Nu, kion Vu Gang⁷³ havas por regali l’ gastojn?

Jen vinon de osmanto dolĉa⁷⁴ li prezentas.

Svingante la manikojn larĝajn, la soleca Ĉang’e⁷⁵

Ekdancas en la spaco por animoj la fidelaj.

Raport’ subita: tigro⁷⁶ subigitas en la mondo.

De ĝoj’ ŝprucantaj larmoj tuj turniĝas en pluvegon.

Adiaŭo al la Dio Plago⁷⁷

— Du *Ljuŝi*-poemoj

1 julio 1958

Mi legis el la ĵurnalo Renmin Ribao de la 30-a de junio, ke estas ekstermitaj skistosomoj en Jugjang-gubernio⁷⁸. Sinsekvaj pensoj ŝvebis en mia menso, tiel ke mi neniel povis endormiĝi tiunokte. Kiam la zefiro alblovis milde kaj la matena suno enrigardis tra la fenestroj, turnante la rigardon foren al la suda ĉielo mi ĝoje ekprenis la plumon.

I

Vane abundis glaŭkaj montoj kaj smeraldaj akvoj,
Rimedo mankis eĉ al Hŭa Tŭo⁷⁹ kontraŭ la vermeto!
De veproj plenis mil vilaĝoj, homoj velkis lakes,
Dezertaj iĝis dekmil domoj, kantis nur fantomoj.
Okdek-mil liojn⁸⁰ ni veturas per la Ter' tagnokte,
Kaj vidas en la Kosm' de fore milon da laktvojoj⁸¹.
Se l' Bovgardisto⁸² demandus iam pri la Dio Plago,
Respondu: ĝoj' kaj trist' forpasis same kun la tempo.

II

Sennombraj salikvergoj flirtas en printempa vento,
El sescent-milion' da ĉinoj ĉiu — Ŝun aŭ Jau⁸³.
Laŭ nia vol' ruĝpluv' turniĝas en ondantajn fluojn,
Kaj bluaj montoj formas pontojn kiel ni deziras.
Arĝentaj hojoj falas sur nubtuŝajn kvin montĉenojn⁸⁴,
Ĉe l' tri riveroj⁸⁵ tremas ter' je sving' de feraj brakoj.
Kien vi volas iri, via moŝto Dio Plago?
Paperaj ŝipoj kaj kandeloj⁸⁶ brulas nublumige.

Veno al Ŝaŭŝan⁸⁷

— Ljuŝi

Junio 1959

*Je la 25-a de junio 1959, mi venis al
Ŝaŭŝan, kiun mi forlasis jam antaŭ
tridek du jaroj.*

Malbenas mi l' pasintan tempon kun memor' nebula

Pri la forlas' de hejmo antaŭ tridek kaj du jaroj.

La ruĝa flago levis servutulajn halebarojn,

Dum la tiran' per nigra mano tennis alte skurĝon.

Senfina vivofer' fortigis nian bravan volon,

Por sun' kaj lun' ĉielon novan ni kuraĝas krei.

Kun ĝoj' mi vidas, ke ondulas riz- kaj fabo-kampoj,

Ĉie herooj hejmen iras sub la fum' vespera.

Ascendo al Luŝan

—Ljuŝi

1 junio 1959

Fluge elstaras monto apud la rivero granda,
Sursaltas mi la verdant kreston post kvarcent turniĝoj.
Rigardon fridan ĵetas mi trans marojn al la mondo:
Varmvento blovas pluvon sur riveron ĉieltanĝan.
Super naŭ fluoj ŝvebas nuboj, flosas Flava Gruo;
Al Sanvu⁸⁹ l' ondoj rulas sin, leviĝas blankaj fumoĵ.
Neniu scias, kien iris for prefekt' Taŭ Ĵuanming⁹⁰,
Ĉu eblas terkulturi en la Lando Persikflora?

Surskribo al Foto de Milicaninoj

—*Gjűegju*

Februaro 1961

Vigla kaj brava ĉiu kun fusil' kvinfuta,
Ekzercan placon ekprilumas sun' matena.
Al la filinoj ĉinaj kun aspir' mirinda,
Ja plaĉas tualet' ne pimpa, sed milita.

Responde al Amiko

—*Ljuŝi*

1961

Super la verda Giŭji-monto flugas blankaj nuboj,
Sur vent' rajdante, suben iras laŭ ĝi l' du Princinoj⁹¹.
Ĉiu makulbambu' surportas mil iliajn larmojn,
Iliajn plisojn formas dek mil matenruĝaj nuboj.
El Dongting-lag⁹² neĝblankaj ondoj al ĉiel' impetas,
Super l' Insulo Longa⁹³ ŝvebas kanto terskuanta.
El tio mi ekvolas songi pri senfina vasto,
En bril' aŭrora banas sin la tuta land' hibiska⁹⁴.

La Fea Kaverno de Luŝan

— *Gjűegju*

9 septembro 1961

Fortika pino firme staras en krepusk' vespera,
Transflugas nuboj tumultantaj tamen en trankvilo.
Artplene la Kvernon Fean kreis la naturo,
Senlima belo ja troviĝas sur montpint' dangera.

Responde al Kamarado Gŭo Moĵŭo

— *Ljuŝi*

17 novembro 1961

Kiam ekmuĝis sur la tero tondro kaj tempesto,
Demono tuj aperies el amas' de blankaj ostoj⁹⁵.
La bonzo⁹⁶ estis kvankam stulta, tamen edukebla,
Dum la demon' insida kaŭzas nepre katastrofon.
L' Ora Simio⁹⁵ forte svingis sian pezan madzon,
La jada firmament' puriĝis de nebulo polva.
Al Sun la Sankta⁹⁵ ni aklamas nun el tuta koro,
Ĉar la nebulo de Diablo alŝvebas denove.

Poemo de Gŭo Moĵŭo

Spektinte la Teatraĵon

Sun Vukong Trifoje Batas Blankostan

*Demonon*⁹⁵

— *Ljuŝi*

Prenante pravon por eraro, diablon por homo,
La bonz' bonkoris al demono, ĉikanis amikon.
Senĉese litanies li l' Sorĉvortojn de Kap-ringo⁹⁶,
Lasante la demonon fuĝi de pere' trifoje.
Tang Seng la bonz' meritis punon de mil korpotranĉoj.
Por kio Sun Vukong bezonis ŝiri sian haron!
L' instru' donita ĝustatempe vere indas laŭdon,
Kaj eĉ la Porko pli prudentas ol la malsaĝuloj.

Umeo⁹⁷

— Laŭ melodio *Busŭanzi*

Decembro 1961

Leginte la poemon *Umeo* de Lu Jou⁹⁸, mi
skribis jenajn liniojn utiligante lian temon
sed en la kontraŭ senco.

Vent' kaj pluvo sendis for printempon,

Bonvenigas ĝin flirtanta neĝo.

Estas jam glaci' mil-futa sur apika roko,

Jen ankoraŭ ĉarmas floro branĉo.

Ĉarma, pri printemp' ŝi ne pretendas,

Nur anoncas venon de printempo.

Kiam disvolviĝos pompe floroj sur la montoj,

Meze inter ili ŝi ridetos.

Poemo de Lu Joŭ

Umeo

— Laŭ melodio *Busŭanzi*

Ekster stafet-dom', ĉe pont' rompita,
Sen kompan' ŝi floras forlasita.
Jam ŝi sola drones en ĉagren' dum vesperiĝo,
Plie ŝin atakas vent' kaj pluvo.

Pri printemp' pretendi ŝi ne emas,
Al l' aliaj envii lasante.
Eĉ se la petaloj iĝos kot' post fal' kaj treto,
Restos ŝia bonodor senŝanĝe.

Vintraĵ Nuboj

— *Ljuŝi*

26 decembro 1926

Sub neĝportaj vintraĵ nuboj blankaj flokoj ŝvebas,

Jam sinsekve floroj falis kaj portempe pokas.

Frosta flu' ruliĝas forte tra la firmamento,

Dum varmeto disdonadas milde de la tero.

Sole eblas ke herooj persekutas tigrojn

Kaj neniam kuraĝuloj iel timas ursojn.

Plaĉas al la ume-floro la neĝad' plenspaca,

Ne surpriza la mortaĉ' de muŝoj en frostego.

Responde al Kamarado Gǔo Mojǔo

— Laŭ melodio *Man'gjanghong*

9 januaro 1963

Sur ĉi eta terглоbo

Kontraŭ mur' kelkaj muŝoj sin frapas,

Zuzumadas,

Jen siblante acute,

Jen plorante singulte.

Sur sofor' sin kroĉinte formikoj pri sia regneg' fanfaronas⁹⁹,

Ĉu facials ekskui arbegon por same mizeraj insektoj!

Ĝuste kiam folioj faladas sub vent' okcidenta en Ĉang'an¹⁰⁰,

Fajfo-sagoj pafiĝas.

Tiom multaj aferoj farendaj

Ĉiam urĝas brulige;

La ĉeilo kaj tero turniĝas,

Kaj la tempo premeĝas.

Dek mil jaroj tro longas,

Eĉ momenton alkaptu.

Ĉiuj maroj tumulte turbulas, la nuboj kaj akvoj koleras;

Kaj la kvin kontinentoj ektremas, tempesto kaj tondroj intensas.

Nevenkeblaj ni estas,

For de l' mond' ĉiujn pestojn!

Poemo de Gǔo Mojǔo

— Laǔ melodio Man' gjanghong

Kiam maro inundas,
Elmontriĝas natur' de herooj.
La popolo senescent-miliona
Unuiĝas pli forte,
En principoj persistas.
Se l' ĉielo ekfalas, ĝin ili kapablas subteni,
Kaj la mondon rektiĝas, se ĝi dekliniĝus.
Jen ekkrias la kokoj sonore tra l' tero,
L' oriento lumiĝas!

Jen la suno leviĝas,
Glacimontoj ekgutas;
Pura oro ekzistas,
Ĉu forfandi ĝin eblas?
Kvar brilantaj volumoj¹⁰¹
Al popolo la vojon ja montras.
Tro ridinde bojadas la hundo de Gje kontraŭ Jaŭ¹⁰²,
Pri l' du bovoj argilaj en maron plongintaj: nenia informo.
Ruĝaj flagoj de revolucio flirtadas en vent' orienta,
L' universo ruĝiĝas!

Revizito al Ginggaŝan

— Laŭ melodio *Ŝujdjaŭgetoŭ*
Majo 1965

Delonge mi aspiras al nubalto.

Refoje mi alvenas sur Ginggaŝan
Por vidi la malnovan lokon, fore de mil lioj.
L' aspekt' antaŭa iĝis tute nova:
Ĉie hirundoj dancas, oriojoj kantas,
Plie la akvaj fluoj lirle-lirle flustras,
Kaj alte l' voj' kondukas en nubaron.
Post la transpaso de Hŭang'janggje,
Neniu lok' danĝera indas plu rigardon.

Ekmuĝas vent' kaj tondroj,
Standardoj, flagoj ekscitiĝas —
Jen mondo de l' homaro.
Forpasis jam tridek ok jaroj
Je nura fingrosvingo.
Ni povas ĉirkaŭpreni l' lunon en ĉielo
Kaj kapti ĥeloniojn el kvin oceanoj:
Revenos ni kun rid' kaj kant' triumfe.
Nenio malfacilas en la mondo,
Se oni nur kuraĝas grimpi alten.

Dialogo de Du Birdoj

— Laŭ melodio *Njannugjaŭ*
Aŭtuno 1965

Per sving' flugila, *kunpeng*¹⁰³ ĵetas sin
Naŭdek-mil liojn supren,
Ciklonon eklevante en l' aer' .
Rigardas ĝi malsupren, kun ĉielo sur la dors' :
Vidiĝas urboj kaj vilaĝoj de la homa mond' .
Kanona fajro lekas la ĉielon,
La tero plenas de obusaj kavoj.
Panik' ekkaptas la paseron en herbar' :
“Terure, mia Dio, kion fari!
Aj-ja, mi devas salti, flugi for!”

“Kien vi volas?”
Respondas la paser' :
“Al la juvel-palaco de fe-mont' .
Ĉu vi ne scias? Sub la hela lun' aŭtuna
En l' antaŭlasta jaro subskribiĝis pakt' triflanka¹⁰⁴ .
Manĝaĵo ja ne mankas:
Terpomoj frikasitaj,
Garnitaj per bovaj¹⁰⁵ .”
“Ĉesu kun via furzo!
Sed vidu renversiĝon de la tero kaj ĉielo!”

Klarigoj

Ĉangŝa

1. Ĉangŝa: Ĉefurbo de la provinco Hunan, kie Prezidanto Maŭ lernis kaj sin okupis pri revolucio dum sia juneco.
2. Oranĝ-insulo: Sablo-insulo en Hjanggjang.
3. Hjanggjang: Granda rivero en la provinco Hunan, kiu fluas preter Ĉangŝa norden en la lagon Dongting.

La turo de la Flava Gruo

4. La Turo de la Flava Gruo: Iama vidindaaĵo origine sur la monto Serpento en Vuĉang de la provinco Hubej, konstruita en la dua jaro de la erao Hŭangvu (233 p.K.) de Vu-regno en la periodo de la Tri Regno. La turo ricevis sian nomon laŭ legendo, ke ĝi iam vizitis senmortulo, rajdante sur flava gruo.
5. Naŭ fluoj: Aludo al naŭ riveroj en provincoj Hunan, Hubej kaj Gjanghi.
6. Linio: Aludo al tiamaj Pekin-Hankoŭ-a kaj Hankoŭ-Gŭangĝoŭ-a fervojo.
7. La riverego: Aludo al Jangzi-rivero.
8. La Serpent' kaj la Testud': Aludo al du montoj en Hubej-provinco: Testudo en Hanjang kaj Serpento en Vuĉang sur la du bordoj de Jangzi.

Ginggangŝan

9. Ginggangŝan: Montaro situanta inter la provincoj Gjanghi kaj Hunan. Tie Prezidanto Maŭ fondis la unuan kamparan revolucionan bazon en 1927.
10. Hŭang'janggje: Strategie grava pasejo sur Ginggangŝan. En aŭgusto de 1928, la Ruĝa Armeo kondukis defendan operacion tie.

Milito inter Ĉjang Kajŝek kaj la Gŭanghi-aj Militaristoj

11. Milito inter Ĉjang Kajŝek kaj la Gŭanghi-aj Militaristoj: En 1929 okazis la milito inter Ĉjang Kajŝek kaj la militaristoj de la provinco Gŭanghi.
12. "La sonĝo milia": La rakonto devenas de la novelo *Ĝen Ĝong Gi* (Rakonto pri Mirinda Kapkuseno) el Tang-dinastio (618-907). La novelo rakontas, ke en gastejo malriĉa klerulo plendis al taoisto pri sia mizero kaj neplenumiĝo de siaj revoj. Tiu donis al

li kapkusenon, dirante ke ĉia volo realiĝos, se li endormiĝos sur ĝi. Tiumomente la gasteja mastro estis kuiranta million. En sonĝo la klerulo travivis vivon plenan de gloroj, luksaĵoj, riĉeco kaj nobeleco. Sed, vekiginte, li trovis sin denove senhavulo kiel antaŭe. Dume la milito kuiranta de la gasteja mastro ankoraŭ ne estis preta.

13. Tingĝjang: Rivero en sudokcidenta Fugjan-provinco.
14. Long'jan kaj Ŝanghang: Gubernioj en la sudokcidenta parto de Fugjan.
15. “Pelvo la ora”: Aludo al la teritorio de ŝtato. La esprimo troviĝas en la *Historio de Sudaj Dinastioj* verkita de Li Janŝou de Tang-dinastio: “Nia teritorio estas sendifekto kaj breĉo, kiel ora pelvo.”

La Duobla Naŭa

16. La Duobla Naŭa: Tradicia festotago, nome la naŭa tago de la naŭa monato laŭ la ĉina malnova kalendaro. Tiun tagon en malnova tempo oni ofte surgrimpis altan lokon kaj aprecis krizantemajn florojn. La “flavaj floroj” en tiu ĉi poemo signifas krizantemajn florojn.

Novjara Tago

17. Ninghŭa, Kingliŭ, Gujhŭa: Tri gubernioj en okcidenta Fugjan. En 1930, Prezidanto Maŭ kondukis la Ĉinan Laboristan-Kampanan Ruĝan Armeo tra tiuj tri gubernioj en la provincon Gjanghi trans la monton Vuji, kiu kuŝas inter la du provincoj, kaj fondis la Centran Revolucian Bazon en la suda parto de Gjanghi kaj Ĵujgin-gubernio kiel la centro.

Sur la Vojo de Gŭangĉang

18. Gŭangĉang: Gubernio en sudorienta Gjanghi.
19. Gan-rivero: Ĉefa rivero de Gjanghi, kiu trafluas la provincon laŭlonge.
20. Gi'an: Gubernio en Gjanghi, okcidente de Gan-rivero.

De Tingĝou al Ĉangŝa

21. Tingĝou: La nuna Ĉangting-gubernio en la okcidenta Fugjan.
22. *Kunpeng*: Ĉi tie ĝi aludas la reakcian klikon de Ĉjang Kajŝek. Vidu klarigon 103.
23. Hŭang Gongljŭe: Hŭang Gongljŭe (1898 – 1931), fama komandanto de la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo, estis

estro de la Tria Armeo de la Ruĝa Armeo. En 1930, li komandis la ĉefan forton de sia armeo kaj malfermis revolucionan bazon en la vasta regiono okcidente de Gan-rivero. En Julio, li iris orienten kun siaj trupoj trans la riveron kaj kuniĝis kun la ĉefa forto de la Ruĝa Armeo, kiu sub la komando de Prezidanto Maŭ direktis sin okcidenten de Tingĝoŭ.

Kontraŭ la Unua “Ĉirkaŭekstermo”

24. La unua “ĉirkaŭekstermo”: Temas pri la unua “ĉirkaŭekstermo” fare de cent mil soldatoj senditaj de Ĉjang Kajŝek en decembro 1930, kontraŭ la Centra Revolucia Bazo. Sub la komando de Prezidanto Maŭ, la Ruĝa Armeo gajnis du batalojn en kvin tagoj, ekstermite unu kaj duonan diviziojn (pli ol dek mil soldatojn) kaj kaptis viva la malamikan ĝeneralan frontan komandanton Ĝang Hujzan, kaj tiu ĉi “ĉirkaŭekstermo” estis tiel frakasita.
25. Longgang: Urbeto apud la gubernia urbo de Hingĝoŭ, Gjanghi-provinco.

Kontaŭ la Dua “Ĉirkaŭekstermo”

26. La dua “ĉirkaŭekstermo”: Temas pri la dua “ĉirkaŭekstermo” farita de Ĉjang Kaj ŝek de aprilo ĝis majo 1931, per 200,000 armeanoj kontraŭ la Centra Revolucia Bazo. Sub la komando de Prezidanto Maŭ la Ruĝa Armeo faris heroan rebaton. En dek kvin tagoj de la 16-a ĝis la 30-a de majo, la Ruĝa Armeo marŝis 700 liojn (1 lio = 1/2 km.), sinsekve gajnis kvin batalojn, ekstermis pli ol tridek mil malamikojn, predis pli ol dudek mil pafilojn kaj frakase disrompis tiun “ĉirkaŭekstermon”.
27. La monto Blanka Nubo: Situanta en sudokcidento de Gi-an-gubernio, Gjanghi-provinco.
28. Fluganta General’: Alnomo de Li Ĝuang, kuraĝa kaj eminenta generalo en la tempo de la imperiestro Vudi de Han-dinastio. Ĉi tie ĝi aludas la Ruĝan Armeon.
29. Bastiono ĉiupaŝe”: La taktiko aplikita de Ĉjang Kajŝek en la dua “ĉirkaŭekstermo”.

Dabodi

30. Dabodi: Urbeto en la gubernio Ĵujgin de Gjanghi-provinco. En februaro de 1929, Prezidanto Maŭ komandis la Ĉinan Laboristan-Kamparanan Ruĝan Armeon kaj frakasis la atakon de la reakciaj trupoj de Kŭomintango.

Hujĉang

31. Hujĉang: Gubernio en suda Gjanghi. Ĝi limas kun Fugjan en la oriento kaj kun Gŭangdong-provinco en la sudo.

Loŭŝan-Pasejo

32. Loŭŝan-pasejo: Strategie grava loko inter krutaj montoj, norde de la urbo Zunji en la provinco Gujĝoŭ. En januaro de 1935, la Ruĝa Armeo okupis la urbon Zunji. Tie okazis plivastigita kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. En tiu kunveno estis likvidita la “maldekstra” oportunisma linio de Vang Ming kaj starigita la gvidanteco de Prezidanto Maŭ super la tuta Partio kaj la tuta armeo. Tio estas la grava Zunji-kunveno en la ĉina historio.

Longa Marŝo

33. La Kvin Montĉenoj: Ili estas Jŭeĉeng, Dupang, Mengĝu, Kitjan kaj Daju, kiuj etendiĝas inter la teritorioj de Gjanghi, Hunan, Gŭangdong kaj Gŭanghi.
34. Vumeng: Montaro kuŝanta inter provincoj Junnan kaj Gujĝoŭ.
35. Ginŝa: Nomo de la supra parto de Jangzi-rivero. Tiu parto fluas tra la limo inter Siĉŭan kaj Tibeto en la teritorion de Junnan.
36. Dadu: Nomo de rivero en la provinco Siĉŭan, kies rokaj bordoj abrupte leviĝas alte unu kontraŭ la alia, inter kiuj torentas bole la akvo. Tiutempe la solakomunikilo inter la bordoj estis ferĉena ponto.
37. Minŝan: Montaro etendiĝanta inter la provincoj Siĉŭan kaj Gansu.
38. La tri armeoj: Aludo al la Unua, Dua kaj Kvara Frontaj Armeoj de la Ruĝa Armeo.

Kunlun

39. Kunlun: Montaro en okcidenta Ĉinio. Ĝi etendas sin inter Hingjang kaj Tibeto. Minŝan estas unu el ĝiaj branĉoj.

La monto Liŭpan

40. La monto Liŭpan: Ĝi situas en la suda paro de Ninghja kaj la orienta parto de Gansu. En oktobro de 1935 Prezidanto Maŭ kondukis la Centran Ruĝan Armeon de la orienta parto de Gansu al la suda parto de Ninghja, rompis la blokadon de la malamiko sur la monto Liŭpan kaj venke atingis la revolucion bazon en norda Ŝenhi.

41. Drako Grizblua: Laŭ ĉinaj antikvaj libroj, ĝi estas dio de malfeliĉo, ĉi tie ĝi aludas al Ĉjang Kajŝek.

Neĝo

42. La granda rivero: Aludo al la Flava Rivero.

43. Kin Ŝihŭang: Titolo de Jing Ĝeng (259 — 210 a.K.), la fondinto-imperiestro de Kin-dinastio. Han Vudi: Titolo de Liŭ Ĉe (157 — 87 a.K.), imperiestro de Han-dinastio.

44. Tang Tajzong: Titolo de Li Ŝimin (599 — 649), imperiestro de Tang-dinastio. Song Tajzong: Titolo de Ĝaŭ Kŭang'jin (927—976), la fondinto-imperiestro de Song-dinastio.

La Popola Liberiga Armeo Konkeris Nankinon

45. Nankino: Antaŭ la Liberigo, en Nankino estis la centra registaro de la Kŭomintanga reaktularo. En aprilo 1949, la Popola Liberiga Armeo perforte transiris Jangzi-riveron kaj liberigis Nankinon la 23-an de la sama monato, kio proklamis la pereon de la 22-jara reaktia regado de Kŭomintango.

46. Ĝongŝan: Pranomo de Zigin-monto kuŝanta en la orienta antaŭurbo de Nankino. En la historio, oni uzis la frazon “La monto Ĝongŝan kuŝas drake; la Urbo Ŝtona kaŭras tigre”, por priskribi la strategie gravan situacion de Nankino.

47. La riverego: Aludo al Jangzi-rivero.

48. Hiĉu Bavang: Titolo de Hjang Ju (232—202 a.K.). En la lastaj jaroj de Kin-dinastio, li batalis por regpotenco kontraŭ Liŭ Bang (247—195 a.K.), kiu poste fondis Han-dinastion, dum la rivalado li preterlasis ŝancon ekstermi Liŭ Bang kaj fine estis venkita.

49. Ŝanĝiĝad' de mar' enmoruskampojn: Laŭ ĉina legendo, feino Magu plurfoje vidis la lazuran maron turniĝi en morusajn kampojn kaj inverse.

50. Liŭ Jazi: Ĉina poeto (1887--1958), kiu naskiĝis en Vugjang-gubernio, Gjangsu-provinco. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, li estis elektita kiel membro de la Konsilantaro de la Centra Popola Registaro kaj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

51. Gŭangĝoŭ: La ĉefurbo de Gŭangdong-provinco.

52. Ĉongking: Urbo de Siĉŭan-provinco.

53. Post tridek unu jaroj: En 1918, Prezidanto Maŭ unuafoje venis

de Ĉangŝa al Pekino.

54. Kunminghu: Lago en la Somera Palaco en la okcidenta antaŭurbo de Pekino.
55. Rivero Fuĉun: Supra parto de Kĵantang-rivero, Ĝegjang-provinco.

Poemo de Liŭ Jazi

56. Persvadi Hjang al Liŭ subiĝi: Hjang: Hjang Ju; Liŭ: Liŭ Bang. Vidu klarigon 48.
57. Vulu: Unu el la kortegaj kleruloj en la unua jarcento a.K. Li estis ekstreme aroganta en debato pri la klasikaĵo *Libro de ŝanĝoj*.
58. Feng Hŭan: Unu el gastoj-mangantoj ĉe la nobelo en la tria jarcento a.K. Li ofte aŭdigis plendojn tintigante glavon por gajni de sia gastiganto pli favoran traktadon.
59. “Fiŝejo de Ziling”: Loko ĉe la rivero Fuĉun, kie siatempe fiŝis ermito Jan Ziling en la komenca periodo de Orienta Han-dinastio (25—220 p.K.).
60. Fen-lago: Lago en gubernio Vugjang, provinco Gjangsu. Sur ĝia norda bordo troviĝas lama loĝejo de la aŭtoro.

Responde al Sinjoro Liŭ Jazi

61. Ĉihjan: Aludo al Ĉinio.
62. Juĵjan: Nomo de antikva lando, kies situo troviĝas en nuna Hetjan kaj ĝia ĉirkaŭaĵo en Hin’gjang-a Uĵgura Aŭtonoma Regiono. Tieaj popoloj estas lertaj en dancado kaj kantado. Ĉi tie ĝi aludas la Ensemblon de Hin’gjang, kiu venis prezenti en Pekino, okaze de la unua datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Bejdajhe

63. Bejdajhe: Ĝi troviĝas okcidente de Kinhŭangdaŭ, provinco Hebej, ĉe la bordo de Bohaj-mar.
64. Joŭ-Jan: Antikva nomo por la regiono ampleksanta la nunajn nordan Hebej kaj provincon Ljaŭning.
65. Vej Vudi: Titolo de Caŭ Caŭ (155—220).
66. Gjeŝi: Monto ĉe Bohaj, kien venis Caŭ Caŭ en 207 kaj verkis poemon *Rigardo al la Lazura Maro*, en kiu estas versoj: “Orienten al Gjeŝi” kaj “La aŭtuna vent’ susuras”.

Naĝado

67. Ĉu: Nomo de reĝlando en la tempo de la Militantaj Regnoj, ĝia teritorio ampleksis ĉefe la nunajn provincojn Hubej kaj Hunan.
68. Pontego: Aludo al la tiam konstruata Vuhan-a Pontego super Jangzi.
69. Vuŝan: Monto situanta en sudoriento de gubernio Vuŝan de la provinco Siĉŭan. Sur la monto vidiĝas Diina Montpinto, kie, laŭ legendo, loĝis la diino reganta nubojn kaj pluvojn.

Responde al Li Ŝuji

70. Li Ŝuji: Instruistino de la ĉina lingvo en la Deka Mezlernejo de Ĉangŝa, provinco Hunan. En februaro de 1957, ŝi sendis al Prezidanto Maŭ la de ŝi verkitan *ci*-on memore al martiro Liŭ Ĝihjun. Prezidanto Maŭ respondis al ŝi per tiu ĉi verko.
71. Jang: Aludo al martirino Jang Kajhui (1901—1930), edzino de Prezidanto Maŭ. En 1921, ŝi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. En 1923, sekvante Prezidanton Maŭ, ŝi okupiĝis pri laborista, kamparana kaj virina movadoj en Ĉangŝa, Ŝanhajo, Ŝaŭŝan, Gŭangĝoŭ kaj Vuhan. En 1925, akompanante Prezidanton Maŭ, ŝi venis al Ŝaŭŝan kaj tie helpis lin en fondo de partia organizo kaj disvolvo de kamparana batalo. En 1927, post la malsukceso de la Granda Revolucio, Prezidanto Maŭ kondukis revoluciajn trupojn al Ginggangŝan. Laŭ direktivo de Prezidanto Maŭ, kamaradino Jang Kajhuj restis en Ĉangŝa kaj daŭrigis subteran laboron de la Partio kaj organizadon de kamparanoj al armita batalo. En 1930, ŝi estis arestita de kŭomintangaj reakciuloj kaj matiriĝis heroe. Kamaradino Jang Kajhuj estis kunlernantino kaj bona amikino de Li Ŝuji.
72. Liŭ: Aludo al martiro Liŭ Ĝihjun (1898—1932), edzo de kamaradino Li Ŝuji kaj kunbatalanto de Prezidanto Maŭ. En 1923, li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. Iam li estis ĉefsekretario de la Hunan-a Kamparana Asocio kaj partoprenis en Nanĉang-a Leviĝo de la Unua de Aŭgusto 1927. En 1932, li oferis sian vivon en la batalo ĉe Honghu-lago, provinco Hubej.
73. Vu Gang: Feo, kiu hakadis dolĉan osmantarbon sur la luno laŭ la ĉina mito.
74. Osmanto dolĉa: *Osmanthus fragrance*.
75. Ĉang'e: Diino sur la luno laŭ la ĉina mito.
76. Tigro: Aludo al la kŭomintanga reakciularo.

Adiaŭo al la Dio Plago

77. La Dio Plago: Laŭ la legendo epidemioj estas kaŭzitaj de tiu dio. Tie ĉi temas pri skistosomozo.
78. Jugjang-gubernio: Ĝi situas en la orienta parto de Gjangsu-provinco kaj iam estis peze plagita de skistosomozo.
79. Hŭa Tŭo: Fama kuracisto en la antikva Ĉinio.
80. Okdek-mil lioj: Proksimuma longo de la ekvatoro.
81. Milo da laktvojoj: Aludo al la Lakta Vojo kaj aliaj galaksioj.
82. Bovgardisto: Ĉina nomo por Altairo. Laŭ la legendo ĝi estas personigo de kamparano.
83. Ŝun aŭ Jaŭ: Ambaŭ estis tre bonaj reĝoj en la antikveco, laŭ ĉina legendo.
84. Kvin montĉenoj: Aludo al la sudo de Ĉinio.
85. Tri riveroj: Aludo al la meza baseno de la Flava Rivero en la centra parto de Ĉinio.
86. Paperaj ŝipoj kaj kandeloj: Laŭ malnova moro oni bruligis paperajn ŝipojn kaj kandelojn por forsendi diojn kaj fantomojn.

Veno al Ŝaŭŝan

87. Ŝaŭŝan: Naskiĝloko de Prezidanto Maŭ, troviĝanta en Hjangtan-gubernio de Hunan-provinco.

Ascendo al Luŝan

88. Luŝan: Monto situanta norde de Giŭgjang-urbo de Gjanghi.
89. Sanvu: Sanvu (tri Vu-oj) konsistas el la nunaj Suĝoŭ (antikve la orienta Vu), Ĉangĝoŭ (antikve la meza Vu) kaj Huĝoŭ (antikve la okcidenta Vu), en malsupra baseno de Jangzi.
90. Taŭ Jŭanming: Fama poeto (365—427), kiu estis iam guberniestro en Gin-dinastio. Lia hejmloko troviĝis proksime al Luŝan. Li verkis poemon kaj rakonton pri persikflora Lando, en kiuj li priskribis utopian socion.

Responde al Amiko

91. Princinoj: Aludo al Ehŭang kaj Njujing, la du filinoj de la reĝo Jaŭ el ĉina mito. Ili edziniĝis kune al Ŝun, kiu heredis la tronon de Jaŭ. Ŝun mortis en Hunan dum inspektado al sudo, kaj estis enterigita sur Giŭji-monto. La du princinoj serĉis Ŝun ĝis rivero Hjanggjang de Hunan kaj dolore ploradis. Iliaj larmoj makulis bambuojn.
92. Dongting-lag': Ĝi troviĝas en Hunan-provinco.

93. Insulo Longa: Alia nomo de la Orangî-insulo. Vidu klarigon 2.

94. Land' hibiska: Aludo al Hunan-provinco.

Responde al Kamarado Gŭo Mojŭo

Poemo de Gŭo Mojŭo

95. *Sun Vukong Trifoje Batas Blankostan Demonon*: Ŝaŭhing-a opero de Ĝejjang-provinco, kiu estis scenarigita laŭ rakonto el *Pilgrimado al la Okcidento*, ĉina mita romano el la deksesa jarcento. La rakonto temas pri la bonzo Tang Seng, kiu iris al la Okcidento por akiri sanktajn tekstojn de budaismo kun siaj disĉiploj Sun Vukong (alinome Ora Simio aŭ Sun la Sankta), Ĝu Bagie (Porko) kaj Ŝa Seng. Survoje ili renkontiĝis kun demono estingiĝinta el blanka ostaro. Por vivi eterne, la demono volis manĝi la karnon de Tang Seng. Ĝi sinsekve transformis sin en belan knabinon, oldan virinon kaj maljunulon, por trompi la bonzon. Sed Sun Vukong ĉion travidis kaj fine mortbatis ĝin per sia madzo.

96. Sorĉvortoj de Kap-ringo: Laŭ la romano *Pilgrimado al la Okcidento*, por superregi Sun Vukong, Tang Seng metis oran ringon ĉirkaŭ la kapon de Sun. Okaze se Sun malobeis lin, tiu litaniis sorĉvortojn por malgrandigi la ringon kaj kaŭzi al Sun neelteneblan doloron.

Umeo

97. Umeo: Ĝi floras en vintro. Ĉinaj poetoj ofte komparas la noblan purecon kaj firman fidelecon de homo kun la aromo de umefloro kaj ties maltimo al frosto.

98. Lu Joŭ: Poeto (1125—1210) el Suda Song-dinastio.

Responde al Kamarado Gŭo Mojŭo

99. Sur sofor' sin kroĉinte formikoj pri sia regneg' fanfaronas: Laŭ la romantika novelo el Tang-dinastio *Biografio de Prefekto de Suda Branĉo*, iu ebrulo endormiĝis kaj songis, ke li fariĝis reĝidina edzo kaj prefekto de Suda Branĉo en la Granda Soforlando. Fakte tiu "lando" estis nenio alia ol formika nesto sub soforarbo.

100. Ĉang'an: Fama antikva ĉefurbo, nun Hi'an, provinco Ŝenhi.

Poemo de Gŭo Mojŭo

101. Brilantaj volumoj: Aludo al la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*.

102. Bojadas la hundo de Gje kontraŭ Jaŭ: Ĉina proverbo. Laŭ

legendo, Gje estis reĝo tirana kaj kruela, dum Jaŭ tre bona kaj amata.

Dialogo de Du Birdoj

103. *Kunpeng*: La fablo pri *kunpeng* troviĝas en la ĉapitro *Hjaŭ Jaŭ Joŭ* de la filozofia verko *Ĝŭangzi* el Militantaj Regnoj (475—221 a.K.). Estas dirite: “En la Norda Maro vivas fiŝo nomata *kun*, kies grandeco ampleksas neniu scias kiom da mil-lioj. Poste ĝi transformiĝis en birdon kaj ricevis la nomon *peng*, kies dorso ampleksas neniu scias kiom da mil-lioj. Kiam ĝi ekflugas ĉe kolero, ĝiaj flugiloj kovras la ĉielon kiel nubegoj... Levante ciklonon je naŭdek mil lioj supren... kun la ĉielo sur la dorso, ĝi estas neniel haltigebla...”
104. Pakt’ triflanka: Aludo al la Pakto de Parta Malpermeso de Nukleaj Eksperimentoj, subskribita de la ministroj pri eksteraj aferoj de Usono, Britio kaj Sovetunio en Moskvo la 5-an de aŭgusto 1963.
105. Terpomoj frikasitaj, garnitaj per bovaĵ’: Aludo al la gulaŝa “komunismo” de Ĥruŝĉov.

Noto Pri la Versformo

Ĉiuj poemoj en tiu ĉi volumo estas verkitaj en la ĉinaj klasikaj formoj. La poemoj kun indiko de melodio apartenas al la tipo de *ci*, kaj la ceteraj al la tipo de *ŝi*, kiu havas du variojn: *ljuŝi* (mallongigita kiel *lju*) kaj *gĵegju* (mallongigita kiel *gĵe*).

Ci originis en Tang-dinastio (618—907) kaj estis propre destinita por esti kantata laŭ certa ario. Ĉiu ario postulas tekston strikte adekvatan en tontipo, rimskemo, kaj nombro de versoj kun difinita varia longeco. La nomoj *Kinjŭanĉun*, *Pusaman* kaj aliaj indikas ne la temon de respektivaj poemoj, sed nomon de la ario, laŭ kiu la poemo estas verkita.

Ljuŝi kaj *gĵegju* estas du formoj de *ŝi*, kiuj burĝonis en pli fruaj tempoj kaj plene establiĝis en Tang-dinastio. Kun strikta tontipo kaj rimskemo, la *ljuŝi* konsistas el ok versoj ĉiu kun kvin aŭ sep ideogramoj, kaj la tria verso devas esti kontraŭstarigita al la kvara

kaj la kvina al la sesa, tiel en senco kiel en tontipo. La *ljuŝi* en tiu ĉi volumo estas de la sep-ideograma tipo. La *gĵuegju* konsistas el kvar versoj ĉiu kun kvin aŭ sep ideogramoj. Ĝi estas duonigo de *ljuŝi*, kies tria kaj kvara versoj kvankam ankoraŭ kontraŭstaras en tontipo, tamen ne necese en senco. La *gĵuegju* en tiu ĉi volumo estas de la sep-ideograma tipo.

Pri Transskribo de Ĉinaj Sonoj

En tiu ĉi poemaro estas multaj ĉinaj propraj nomoj. Por transskribi ilin en Esperanton ni uzas la sistemon praktikatan de *El Popola Ĉinio*. Sed la nomita sistemo iurilate estas ne taŭga por poezio, nome ĝi transprenas senŝanĝe la diftongong el la Fonetika Alfabeto de la Ĉina Lingvo, tiel ke aldoniĝas plia silabo. Tial ni devas fari necesan modifon al la sistemo, nome en ĉiu diftongo ni konservas nur la ĉefan vokalon en literumado kaj anstataŭigas la flankan vokalon laŭbezone per *j* aŭ *ŭ*. Tiamaniere ni evitas la pliigon de nedezirata silabo.